

# EKO 2023



Nia aganto pri  
instruado kaj  
progreso

**Pensu globe, Agu loke! Por la Landa kaj Faka Laboro**

**Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj**



**EKO 2023 / 56. Oktobro 1, 2023**

**Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK**

**Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Elda Doerfler, Gbeglo Koffi.**

**Pezo: Word nur teksto: 40 KB; Ĝia sveltigita PDF: 630 KB. Sume: KB 670**

## **Internacia Kongresa Universitato iras al Afriko**

Kadre de la 109-a UK en Aruŝo, Tanzanio, okazos la 77-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato (IKU). UEA invitas proponojn por IKU-prelegoj, kiuj estu sendataj al la IKU-sekretario <[amri@huji.ac.il](mailto:amri@huji.ac.il)> ĝis la 31-an de januaro 2024. Lige kun la IKU okazos studsesio de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) kaj la Scienca Kafejo (SK). Kandidatoj por IKU-prelego povas proponi AIS-kurson, kiu konsistos el unu IKU-prelego, 1-2 kromaj prelegoj kaj eventuale ekzameneto. Eblas proponi nur por la SK, kiu konsistas el pli mallonga (ĉ. duonhora), pli popular-nivela prelego. Bonvolu indiki, ĉu via propono estu konsiderata ankaŭ kiel AIS-kurso, aŭ nur por la SK. Oni planas vivelsendojn de la IKU-prelegoj. La proponoj estu pri interesaj, allogaj temoj kaj taŭgaj por klera publiko. Ĉiu propono enhavu mallongan resumon de la prelego kaj koncizan (ĉ. 5-linian) biografieton de la preleganto. Bonvenas proponoj de personoj, kiuj ne jam aŭ malofte prelegis en IKU. La proponoj estos profesie prijuĝitaj de la IKU-komisiono. Tiuj, kiuj ne estos elektitaj por la IKU, povos esti konsiderataj por la SK. Ĉiu preleganto devas esti kongresano kaj mem zorgi pri sia aliĝo ([uk.esperanto.net/2024](http://uk.esperanto.net/2024)). Akceptita IKU-prelego estos rekompencita per honorario de € 240. Por IKU/AIS-kurso la honorario estos € 300 kaj por SK €120. Duono de la honorario dependas de ĝustatempa livero de la teksto por la IKU-libro kaj duono de la fizika prezentado de la prelego. Pliaj detaloj kaj antaŭaj prelegoj kaj resumoj: en la retejo de IKU: [uea.org/kongresoj/universitato](http://uea.org/kongresoj/universitato). Kiel la rektoro estis nomumita d-ro Élisée Byelongo, de Kongo DR kaj Sud-Afriko

Fonto: revuo Esperanto, oktobro, p. 212

## **Aliĝoj por la UK en Aruŝa**

Je la 28-a de septembro UEA registris 121 personojn el 36 landoj. Elstaraj landoj estas Tanzanio (15), Germanio (12), Usono (7) kaj Brazilo (7), Italio (6), Francio (5) kaj Japanio (5). La plej lasta stato de aliĝoj ĉiam spekteblas ĉe:

<https://uk.esperanto.net/2024/>

**Ĝisdatigu lastmomente!**

## Fervojista historio alirebla

Se vi estas interesata pri la arkivo de IFEF, vi trovos la tutan kolekton en "Bitoteko" ekde la jaro 1951 ĝis hodiaŭ krome mi aldonis tie ankaŭ la 31 numerojn de Fervojfakaj Kajeroj kaj la Historio de IFEF. Mi esperas ke ili restos en memoro kaj nia historio ne perdiĝos. Jen la kunligo al la kolekto:

<https://www.bitoteko.it/collections/show/95>

Vito Tornillo, Italio

## Pri la enhavo de IPR 2023/3 (Jarkolekto 53)

- Enkonduko (Ahmad Reza MAMDUHI) p.3
- MAMDUHI: ILEI-kongreso 2023: la plej hibrida kongreso! p.4
- Impresoj pri la ILEI-kongreso (Danijela Petroviĉ kaj Blanka LASLO)
- Instruista trejnado pri interkultura kompetento (Radojica Petroviĉ) p.7
- Alessandra MADELLA: Pri Sgrafitoj de MA-GA-Filmoj p.10
- Alessandra MADELLA: Pri Virina Agado kaj la Kongresa Temo p.12
- Erasmus+ por ILEI: Alvoko el Serbio (R. Petroviĉ, A. Laslo, J. Zarkoviĉ) p.16
- Superrigardo pri inkluziva lingvaĵo (II.) (Cesco Reale, Alessio Giordano) p.19
- El la landoj kaj sekcioj (CN, IT, HR, RS, UA) p.25
- AMO, EKO kaj dissendo de instruhelpiloj (Stefan MacGILL) p.31
- Malkovru, lernu kaj uzu Esperanton kun uTalk! (Rob EBENAU) p.32
- Informoj pri ILEI, redakciaj informoj p.36

## AMO 103 survojas en la 19-a de oktobro

La ĉefa temo estas "Virinoj, kiuj ŝanĝis la mondon". Prelegos:

1. Ermanno Taracchini kaj Laura Barbieri – „Maria Montessori kaj Antonietta Bernardoni, du kuracistinoj kaj pedagog-sciencistinoj, kiuj dediĉis sian vivon al la edukado por nova mondo”
2. Małgosia Komarnicka - "Maria Skłodowska-Curie - simbolo de virina forto, determinado, liberigo kaj la potenco de scienco”
3. Martha Otto - "Lidia Zamenhof, kiu vere ŝanĝis mian vivon".

Ĉiu prelego daŭros pli malpli 40-45 min.

## Feliĉo el Uzbekio

La Silka Vojo, tra kiu fluis ne nur varoj, sed ankaŭ kulturoj, ideoj, komprenoj pri la mondo estis dum jarmiloj vojo de renkontiĝoj kaj de kunlaboro kaj de paco. Tra ĝi Marko Polo atingis Pekinon kaj ĉinaj, mongolaj kaj uzbekaj varoj kaj ideoj atingis Venecion, alivorte la Okcidenton. Zamenhof, kiam li kreis Esperanton elpensis krei novan spiritan silkan vojon por unuigi la homaron, kaj en ĉi tiu “nia murd-epoko” ni bezonas la vojon de Esperanto al sincera dialogo inter ĉiuj popoloj por atingi justan pacon. Pro tio estas nova libro "La pordo de la feliĉo", kiu aperis en Uzbekio fare de Gafur Mirzo, restariganto de la uzbeka Esperanto-movado. Ĝi estas aĉetebla ĉe la libroservo de UEA.



**Pordo de la feliĉo**, La. *Gafur Mirzo*. **Miksita literaturo**. Nurafshon business. Taŝkento.2023. 62 paĝoj. Prezo: 9.00 €. Kolekto de poemoj, prozaĵetoj, eseetoj. Kun iom da fotoj.

## Ĉu vi jam IRIS por kontribui?

La junulara sekcio de UEA, Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), pere de sia komisionoj pri Edukado, Scienco, Kulturo kaj Universitata Agado, denove organizas la **Internacian Retan Interfakan Simpozion (IRIS)**, okazonta **de la 27-a ĝis la 30-a de oktobro 2023**: <https://www.tejo.org/de/iris-2023>.

IRIS havos du partojn: mallongaj fakaj prelegoj, kiuj estos [spekteblaj en jutuba kanalo de TEJO](#), kaj podiaj diskutoj pri tiuj fakoj dum Retoso. **Se vi estas studento aŭ esploristo kaj volas prezenti vian laboron al fakemaj esperantistoj, ni invitas vin aliĝi per tiu ĉi formularo** ([mallonge.net/IRIS2023-proponilo](http://mallonge.net/IRIS2023-proponilo)).

La organizantoj esperas ricevi kontribuojn **plej laste la 15-an de oktobro 2023**. UEA subtenas la eventon per informado kaj subtenos TEJO-aĝajn kontribuantojn al la ĉi-jara IRIS per senpaga membreco en UEA-TEJO (se ili ankoraŭ tion ne havas) por la jaroj 2023 kaj 2024, inkluzive de aliĝo al la 4-a Virtuala Kongreso de Esperanto (<https://vk.esperanto.net>), kiu okazos post IRIS/Retoso, de la 23-a ĝis la 26-a de novembro 2023. Sendu viajn kontribuojn al IRIS!

Dum [IRIS 2021](#) okazis podiaj diskutoj pri lingvistiko, sociologio, antropologio, internaciaj rilatoj, astronomio, inĝenierarto, biologio, psikologio, matematiko, fiziko kaj fervojoj. **La podiaj diskutoj estos malfermaj al ĉiuj**, ĉu membroj ĉu nemembroj de UEA-TEJO. Oni povas nun [aliĝi al telegrama grupo de IRIS](#). Por pliaj informoj, kontaktu la organizteamon ĉe [interfaka.simpozio@gmail.com](mailto:interfaka.simpozio@gmail.com).

Laŭ Gazetara Komunikado de UEA.

## Plia kurso por hispanlingvanoj

La 7-an de septembro malfermiĝis la aliĝ-periodo de la Esperantaj kursoj de UNED (la hispana nacia distanca universitato), kiu fermiĝos la 23-an de oktobro. Bonvolu diskonigi ilin tra ĉiaj kanaloj, aparte nacilingve kaj al ne-esperantistoj. Ni alkroĉas modelan priskribon kiun vi povas traduki kaj adapti laŭ via bontrovo. La dua kurso (B1), instruata tute en Esperanto, aparte interesos homojn en landoj kie tianivela reta kurso ne ekzistas. Ankaŭ la unua nivelo (A1-A2) povas interesi komencantojn flue legantajn la hispanan. Ĉar ne estas deviga la partopreno en la konversaciaj kunsidoj (kiuj kutime okazas laŭ mezeŭropa horo), povas aliĝi lernantoj el ĉiuj kontinentoj. Atentu tamen, ke kiu volos ricevi la diplomon devos kontroli proksimecon al ekzamenejo de UNED.

Rubeno Fernandez

## Hispanio kaj Kongo DR enj kunlaboro

Realigi la Esperanta Klubo en la Universitato de Seviljo (Hispanio). La celoj de la klubo estas apogi Esperanton en la universitato, montrante ĝin kiel taŭgan universitatilon kaj realigi internaciajn rilatojn pere de Esperanto, ĉefe kun Afriko kaj, ene de ĝi, kun la Universitato de la Espero en Baraka, kies rektoro estas la esperantisto Elisée Byelongo Isheloke, kaj kie nun profesoro lernas Esperanton.

La asocio havas ĉi tiujn celojn:

1. Diskonigi la lingvon Esperanto kiel universitatilon, tio estas taŭga lingvo por la esplorado, la edukado, la servo al la socio kaj la realigo de internaciaj retoj; kaj kiel nehegemonian komunikilon, kiu faciligas la stariĝon de internaciaj horizontalaj rilatoj.

2. Fortigi internacian kulturon universitatan, kiu reliefigu la gravecon de la lokaj lingvoj kaj provas rimedojn pri komunikado, kiuj ne favoras al iuj lingvoj sur aliaj.
3. Kunlabori kun la Universitato de la Espero en Kongo DR (Baraka regiono) pri ĝia institucia fortiĝo, per la komuna elekto de Esperanto kiel internaciigilo.
4. Helpi la stariĝon kaj la fortiĝon de ia internacia afrika reto de universitatoj, kiuj aranĝiĝas sur la gvido de Baraka, per Esperanto kiel universitata internacia komunikilo.

Viko

## Hungariaj esperantistoj deklaris sin

En la censo de 2022 deklaris sin parolantoj de Esperanto 4216 personoj (1609 viroj kaj 2607 virinoj). El tiuj 1089 loĝas en Budapeŝto.

Nombro de personoj, deklarintaj pri Esperanta lingvoscio tra la jaroj.

Censo 1991 - 2.083 personoj

Censo 2001 - 4.575 p (1765 viroj, 2810 virinoj)

Censo 2011 - 8.397 p (la unua, aktiva duono de la deviga lingvo-ekzameno.

Inter 2001-2009 sukcesaj ekzamenoj: 24.500 personoj)

Censo 2022 - 4.216 p (je 2 jaroj post la fino de la deviga lingvo-ekzameno

Inter 2001-2022 sukcesaj ekzamenoj: 35.815 p)

Jen la aĝdistribuo de la parolantoj:

Sub dekjara: 13, 10-19 jara: 49, 20-29 jara: 275, 30-39 jara: 779, 40-49 jara: 1596, 50-59 jara: 808, 60-69 jara: 350, 70-79 jara: 233, 80-89 jara: 98. 90-jaraĝ: 15.

SMG: La plej alta cifero estas linter 40- kaj 49-jara, plene dek jarojn pli juna ol la aĝo de la membraro de UEA kiu estas 60-69-jara.

Reage al la informo, venis el 'La ondo de Esperanto' en Rusio: laŭ la censo, aranĝita en Ruslando nur 753 ruslandanoj el 147 milionoj da loĝantoj indikis sian scion de Esperanto. Do, almenaŭ unu ruslandano inter ĉ. 195 mil scias Esperanton, aŭ en Ruslando estas kvin esperantistoj por unu miliono da loĝantoj.

Laŭ informoj de László Szilvási kaj Gergo kaj Ondo.

===== vortoj: 1450 =====

**La kolekto de EKO por 2023:** <https://www.ilei.info/agado/EKO.php> (ĝis 50).

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.

Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/> .:

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.